

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (956) • 2022 •

Kongresanoj en Domaszék, Hungario
71a KELI-kongreso, 2022
Antaŭ la kongresejo



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

"Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili"	99
Kongresa raporto — 71a KELI-kongreso	104
Sekretmiraklo	109
Informo kaj aliĝilo al kristana kongreso en Bjalistoko — 72a KELI-kongreso	110
La morto de Peregrino	113
Informo kaj aliĝilo al Bibliaj Tagoj	117
Ĉu la homa vivo estas vana?	119
El multaj grajnoj la unu pan'	120

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, finfine alvenas la gazeto post sufiĉe longa malfruo. Tro da aliaj devigaj taskoj kaj laboro kaŭzis la malfruigon. Mi konsolas min per la sveda proverbo, ke "kiu atendas ion bonan, tiu atendas ne tro longe". Samtempe tio postulas min liveri al vi legindan gazeton. Mi esperas kaj supozas ke mi sukcesas, ĉar la promesita kongresa raporto aperas en tiu ĉi numero. Ni, kiuj havis eblecon kongresi, tre bone fartis kaj esperas denove renkontiĝi niajn geamikojn ie iam. Eble jam sekvontjare.

Do, vi trovas ĉi-numere du aliĝilojn, unu al la KELI-kongreso en Bjalistoko komence de aŭgusto 2023 kaj unu al la Bibliaj tagoj en Trier en marto. La organizantoj esperas ke vi havos eblecon partopreni unu aŭ eble eĉ ambaŭ renkontiĝojn/kongresojn.

Kiajn somerajn travivaĵojn vi havis? Mi volonte publikigos viajn raportojn en iu estonta Dia Regno.

Mi deziras al vi bonan legadon!

“Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili”

Dua prelego dum la kongreso en Domaszék, julio 2022

Philippe COUSSON, FR

La unuan fojon, ni rigardis la eblajn respondojn al la demandoj: *Kiu mi estas?* Kaj *Kiu oni diras ke mi estas?*

Ni vidis ke la problemo pri la serĉo de identeco ne estas tiel evidenta. Ni finis per transiro al alia demando, ligita, *Kiuj ni estas?*

Mi plie diris ke identeco estas ankaŭ afero pri rilatoj. Kiel mi rilatas al la alia, al la medio kultura, al la historio.

Kio do estas mia rilato al la aliaj? Kio do estas nia rilato al la aliaj?

Ni

En pluraj lingvoj ekzistas du pronomoj kiuj distingas inter du “*ni*”, la inkluziva kaj la ekskluziva.

Mi klarigas: mi estas kun du amikoj kaj mi parolas al alia grupo.

La unua “*ni*”, la ekskluziva, rilatas al mi, kiu parolas, kaj al miaj amikoj, sed ne al la alparolotoj.

La alia “*ni*”, inkluziva, rilatas al mi, al miaj amikoj kaj ankaŭ al la alparolotoj.

Mi ne scias ĉu iu eŭropa lingvo havas tiun distingon. Ĝi ekzistas en lingvo en la afrika lando, kie mi estis.

La signifo de tio estas, ke kiam oni diras “*ni*”, eĉ se la distingo ne ekzistas formale en la parolata lingvo, oni devas komprenigi, kiun signifon oni donas al

tiu “*ni*”, ĉu temas pri “*ni kun vi*” aŭ “*ni sen vi*”. Foje estas eĉ “*ni kontraŭ vi*”.

Mi parolis pri identeco ankaŭ en formo de aparteno. Ĉu kiam mi parolas, mi sentigas, ke kun vi mi dividas ion, dividas apartenon, aŭ ne?

Parolado, konversacio, povas tiel marki, indiki kio kunigas kaj kio disigas. Kio estas la diferencoj, kaj kiunivele, kio estas komuna kaj kio ne.

Pierre Bourdieu¹ indikas ke “la socia identeco difiniĝas kaj firmiĝas en la diferenco”. Tamen, se estas diferencoj disde la “aliuloj”, tio estas ke estas komunaj trajtoj. Insisti pri la diferencoj, pri la apartaj kutimoj kaj tradicio prezentas riskon, nome transformi distingon al ekskludo. Alia risko kiam oni pensas pri la persona identeco estas: la kolektiva identeco malhelpas al persona libereco, al libereco pri konscienco. Kiam la diferencoj disde la aliuloj fariĝas pli grava ol la konstruo de io komuna, la rakonto pri io



Philippe Cousson prelegas.
Fotis B. Åradszon

komuna, ĝi samtempe apartigas la anojn disde la ceteraj homoj kaj ne permesas la aŭtonomecon de la persono.

La nuna krizo de identeco estas manko de komunaj orientiloj, de komunaj apartenoj. Ĝi estas krizo de la individuo kaj de la kolektivo. Ĝi indikas perdon de la senco de tio, kio estas komuna.

Ekzistas multaj homaj kulturoj, civilizoj, kiuj disvolviĝis laŭ la historio en diversaj lokoj, kiuj komunikis kaj interŝanĝis elementojn. Okazis, okazas ĉe ili influoj, miksadoj, rilatoj, kaj ankaŭ internaj diversiĝoj.

Kulturojn konsistigas diversaj elementoj, lingvoj, institucioj, ritoj, kutimoj. Ili konstruas kolektivajn identecon kaj permesas al individuoj konstrui proprajn identecojn en tiu kadro.

Sociologoj kaj etnologoj analizis kiel funkcias kulturo kaj kiamaniere ĝi estas transdonita al la posta generacio. Tiu transdono estas ankaŭ parto de la konstruo de la identeco de la homoj, unuope kaj grupe.

La alia

La homaj socioj estas same eraremaj kiel ĝiaj anoj. Etnocentra vidpunkto kiu vidas sin mem kiel pli “civilizita” kondukas al rigardo al la aliaj kun moknomoj. Kelkaj el tiuj moknomoj restis. La barbaroj, kiel la berberoj, estas tiuj kiuj ne scipovis paroli la grekan kaj balbutis. La ĝermanoj estis por slavaj popoloj *njemec*, tio estas mutulo. Vandaloj estis ĝermana tribo kiu detruis antaŭ ol instaligi en Andaluzio (Vandaluzio) kaj Norda Afriko kaj Sicilio. Ili estis kristanoj, sed arianoj. Sovaĝuloj signifis

origine homoj el la arbaro. Inverse, multaj homgrupoj, etnoj simple nomiĝas “*la homoj*”, supozante ke la aliaj ne estas vere homoj.

Nia moderna epoko ne multon gajnis tiurilate. Oni apudmetas progresiga socio kaj primitiva socio. Kio estas “primitiva” socio? Nia kulturoj ĉiuj havas la saman aĝon, tiun de la homaro.

Alia termino, nun “politike korekta”, estas la “unuaj nacioj”. Tio supozigas, ke la unue loĝanta sur unu teritorio havas pli da rajtoj. Sed, krom eble en parto de Afriko, ĉiuj homaj grupoj migris, fakte, la “unuaj nacioj” estas simple tiuj kiuj setlis en unu loko kaj, kiam alvenis aliaj, restis sen regi la teritorion. Tio estas jura termino por redoni parte memregadon.

Mi jam parolis pri la rakonto kolektiva, pri ankaŭ mita pasinteco, pri kutimoj kaj vivstiloj, kiuj helpas konstrui la personecon, helpas aparteni al grupo. Tra tia konstruaĵo oni lernas, spertas tion, kio estas kuniga kaj kio estas disiga. Iamaniere, aparteno al grupo estas samtempe disigo de la ceteraj homoj.

Identeco implicas aliecon certamaniere. La problemo venas kiam ĝi implicas malamikon.

Oni do devas pripensi mem pri kio distingas nin disde la ceteroj, pri la valoro de tiu distingo, pri ĝia karaktero. Aparteni estas ankaŭ diferenciĝi. Ĉu tiu distingo estas ofte malvalorigo de la aliaj, de la malsamaj. Tia maniero funkcii estas tipe tiu de integrismoj. Ekzistas integrismoj religiaj, integrismoj politikaj.

Terure estas kiam tiu distingo fontas el mensogoj. Se temas pri mitologio, oni povas diskuti, analizi, kompari, ekzegezi,

sed pri mensogoj, pri “alternativaj veroj”, pri falsajtoj, oni ne povas diskuti.

Kial la malestimo de la alia? Kio estas la rigardo al la alia?

Identeco, konscio pri identeco povas konduki al rivaleco.

“Kiu volas mortigi sian hundon, akuzas lin pri rabio.”

De diferenco al malamo, oni montras al la aliaj, akuzas ilin, per komunikado troega, malhonesto, mensoga.

Etno, popolo, lando

Mi nun venas al la plej aktuala tikla temo. En Esperanto estas pluraj terminoj proksimaj, kun diversaj difinoj kiuj entenas kromsignifojn, valorojn. Mi listigas: grupo, klubo, klano, tribo, klaso, etno, gento, popolo, nacio, regno, lando, ŝtato. Ekvivalentoj ne troviĝas en ĉiuj lingvoj. Ekzemple ne ekzistas ekvivalento de “gento” en la franca lingvo. Kelkaj radikoj portas plurajn el ili. La slava radikoj *narod* kondukis al la rusa por “popolo” kaj al la pola por “nacio”.

Mi trarigardis la difinojn en PIV 2020. Mi trovis elementojn kiuj troviĝas en kelkaj difinoj sed ne en aliaj, kaj ne ĉio en ĉiuj difinoj.

La ĉefe ofta trajto estas “komuna”, “sama”, “parenca”, “kunigi”. “kune”. Inverse, kelkaj difinoj parolas pri “malsimileco”, “limdifinita”, “specifeco”, “diferencoj”. Oni do retrovas la du karakterizojn de kolektiva identeco, kio kunigas kaj kio disigas.

Alia elemento estas kultura. Temas pri “tradicioj”, “religio”, “totemo”. Parto de la bazo de homa grupo estas civiliza, kultura inkluzive de religio.

Kaj laste, mi notis en pluraj difinoj la referencon al la konscio. La anoj de tiuj grupoj konscias ke ili apartenas al ĝi.

Tiu difino, kiu ŝajne ne kunportas kulturalan aspekton, estas priskribita en jura formo: *regno: suverena politika unuo*. Sed tio ne estas vero. Ĉiu regno havas historion, eĉ se mallongan, portas kulturon.

Mi ankaŭ rigardis al la difinoj de la diversaj naciaj nomoj. El tiu trarigardo, oni tuj antaŭvidas eblajn miskomprenojn inter la esperantistoj laŭ la origina lando. Kaj mi notis evoluon en la redaktado de la vortaraj noticoj.

La du kategoriojn, por simpligi, mi donos per ekzemploj: *franco: civitano de Francio, ruso: ano de slava gento*. Ĉu vi antaŭvidas la miskomprenojn, la diferencojn de konceptoj? En antaŭa eldono de PIV, franco estis same *ano de la ĉefa gento de Francio*. Sed nuntempe, tio tute ne havas signifon. Ne ekzistas franca gento, se iam ekzistis.

Krom kelkaj difinoj kiuj diras “loĝanto”, la divido en Eŭropo estas proksimume duone inter *ano de gento* kaj *civitano*. Sed, la diferenco en la signifo estas giganta kiel la eblaj miskomprenoj.

Esperanto naskiĝis en la Eŭropa parto, kie regis imperioj, kie oni identigis la loĝantojn per la lingvo kaj kulturo, kaj Zamenhof elektis la terminon *gento*. La imperioj malaperis, krom unu, kiel ni vidas ĉijare. Naskiĝis nacioj, kiuj volis kongrui kun gentoj. Sed en la sekvo, tio ne taŭgis. Kaj estas miskomprenoj, iredentismo, kaj militoj.

Kiun vorton uzi por indiki naciecon? Kio eĉ estas nacieco? Laŭ mi, la tendenco

nuna kaj trafa estas identigi la nacion kun la ŝtato, kaj ne kun la gento. La plej trafa argumento venas el sporto, en la naciaj teamoj. En la informiloj, oni indikas ke tiu aŭ alia sportisto estas el tiu nacio, tio estas el tiu ŝtato. Alia argumento venas el la ŝtatoj plurgentaj aŭ alidirite plur-etnaj. Francilingva svizo nepre ne estas franco, sed svizo. Ekzistas la vorto romando. Alia ekzemplo estas la kaŭzo de la komenco de la dua mondmilito, kiam Hitler volis aligi al sia germana Regno la loĝantojn de Ĉeĥoslovakio kiuj parolis la germanan, dirante ke ili estas germanoj. Plia estas la origino de la vorto iredenta. Temis pri la teritorioj sub aŭstra regado kie oni parolis italajn dialektojn, kaj kiujn la tute nova Italio volis aldoni al si. Nuntempa ekzemplo, kiu montras ke la homoj ne havas memoron, estas la invado de Rusio en Ukrainion sub la preteksto de la “genocido” de la rusoj en Ukrainio.

Ankaŭ ekzistas ŝtatoj sen etna aŭ genta karaktero. Ili ĉefe troviĝas en la Amerikoj kaj konsistigas naciojn. La mapo de Afriko montras ke ne ekzistas rilato inter etnoj kaj ŝtatoj pro la koloniado, kaj la mapon ili decidis konservi por eviti militojn interŝtatajn. Sekve la afrikaj militoj estas civilaj enlandaj militoj.

Popolo, kiam ne temas pri jura termino, la *regataro*, t.e. la loĝantaro de ŝtato, de regno, havas signifon inter gento kaj nacio.

Gentoj, popoloj, nacioj vivas inter la pezo de la historio kaj la forgeso de la historio.

La nacioj konstruas al si rakonton, ĝenerale imaga, fantasma, mita, tamen

parte historia. Tion oni nomas la “nacia romano”.

Por konstrui estontecon, la popoloj per arto, literaturo, ktp. prilaboras memoron, rilaton al la tempo, al la pasinteco. Ili troviĝas inter trudiĝanta memoro, kiu plenigas la menson, kaj neanta forgeso, kiu forviŝas. Nuntempo sen pasinteco kaj sen estonteco kondukas nenien.

En la idearo de popolo, aŭ nacio aŭ gento, instaliĝis timoj. Inter ili la timo de la fremdulo, de la najbaro, kies diferencon oni pliigas. Oni sentas minacon, supozas komploton. Oni timas malaperon, subiĝon. En tio rolas la imagaĵo, la supozoj, la konfliktoj pri antaŭeco sur la teritorio. Kaj aldoniĝas mensogoj, propagando.

Kun tiu timemo, oni sentas sin minacata de enmigrintoj kaj volas defendi la nacion, la tradicion. Estas sloganoj teruraj kontraŭ la migrintoj, rifuĝantoj kaj senpatriuloj, kiuj serĉas azilon: “Ni ne plu sentas nin hejme.”

Kaj kiam al ksenofobio aldoniĝas aŭtoritatismo, tiam oni jam troviĝas en faŝismo. Naziismo havas ion plian, se eblas diri, kiu estas la neniigo de la aliulo, al kiu oni atribuas ĉiujn problemojn.

La aŭtoro Amin Maalouf² skribis: “*Ĉu ne estas la unua virto de naciismo trovi al ĉiu problemo kulpulon prefere ol solvon?*”

Alia citaĵo, de Claude Lévy-Strauss³, fama etnologo: “*La barbaro estas tiu, kiu kredas al la barbareco*” [ĉe la alia].

Kunhomoj

Mi rigardis al la demando “*Kiuj ni estas?*”, de homgrupoj ĝis nacioj.

Tamen, oni ne devas halti al tiu nivelo. Nia “ni” ne devas esti ekskluziva. Ĝi devas enteni la tutan homaron. Ĉiu el ni estas ano de la homaro. Mi tre ŝatas tiun vorton en Esperanto, kiun mi malfacile tradukas en la francan: kunhomo. Kio kunigas nin, homojn, estas kunhomeco. Ĉiu homo havas la saman dignon. El tio fontas la homaj rajtoj kaj ties deklaro. Ĝi instalas la aŭtonomecon de la individuo, la eblon de identeco, la neceson de socia kontrakto, de socia protektosistemo por ĉiu kunhomo.

Ĉu homaj rajtoj estas ekvivalentaj al la libereco? Ne necese. Tie kuŝas la diferenco en la principoj de la franca revolucio kaj de la usona revolucio. La homaj rajtoj ne postulas submetiĝon al la leĝo de la merkato eĉ kun la preteksto de libereco. Solidareco estas la vera efektivigo de kunhomeco, de kolektiva identeco, de konscia homara “ni”.

Kiam oni kontraŭmetas la personan, gentan, lokan, nacian identecon kontraŭ la kunhoman, oni mistrafas la esencon.

Oni povas kaj konscii pri sia propra mio, pri siaj diversaj apartenoj kaj ankaŭ pri sia aparteno al la tuta homaro. Mi eĉ aldonus pri sia dependo de la planedo kaj

de ĝia bonfarto. Oni povas esti konscia individuo kaj havi emon al universaleco. Oni povas esti individuo sen esti izolita. Individuo ekzistas ankaŭ per kaj pro siaj diversaj apartenoj.

Tiu kolektiva identeco, kiu kunigas min, nin kaj ilin kune, devas konduki nin al la konstruado de pontoj kaj ne de muroj. Oni ne disigu niajn kunhomojn sed kunigu ilin. Mi estas unu el tiuj kunhomoj.

En la lasta prelego, mi rigardos al tiu problemaro kun la helpo de la Bibliaj tekstoj kaj de teologia pripensado.

- 1 Pierre Félix BOURDIEU [pje:r fe'liks bur'djø] estis franca sociologo, kiu fine de sia vivo iĝis pro sia publika engaĝiĝo unu el la ĉefaj agantoj de la francaj intelektuloj. Lia penso konsiderinde influis la prihomajn kaj prisociajn sciencojn.
- 2 Amin MAALOUF [amin ma'lūf] estas franca verkisto kaj akademiano de libana origino.
- 3 Claude LÉVI-STRAUSS estis franca antropologo, etnologo kaj filozofo. Honora Profesoro en Collège de France, ano de la Franca Akademio li famiĝis kiel unu el la fondintoj de strukturismo.

☞

Sankta Luko 17

20 Kaj kiam la Fariseoj demandis al li, kiam venos la regno de Dio, li respondis al ili, dirante: La regno de Dio ne venas kun observado; 21 kaj oni ne diros: Jen ĉi tie, aŭ: Jen tie! ĉar jen la regno de Dio estas inter vi.

Kongresa raporto — 71a KELI-kongreso

Domaszék, Hungario, julio 2022

Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Ĉijare denove mi (Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU) invitis kristanajn esperantistojn kongresi en Hungario.

Ni havis la kongreson en suda Hungario, en Domaszék, kiu estas malgranda vilaĝo proksime al la fama urbo Szeged.

Nia kongreso okazis en ripozloko de hungara romkatolika eklezio. En bela, granda parko estis la du-etaĝa domo, kie nur ni estis, en vere familia etoso kune.

En la unua etaĝo troviĝis la ĉambroj (kaj la duŝejoj, necesejoj), kaj ankaŭ estis tie malgranda kapelo, kie ni povis fari la matenajn kaj vesperajn preĝojn. Ter-etaĝe estis la manĝosalono, kaj en la kelo estis je nia dispono malgranda, bone ekipita salono, kie ni aŭskultis la prelegojn, kaj ni ankaŭ uzis pli grandan salomon, kiam lokaj dancistoj havis prezentadon.

Apud la ĝardeno estis la romkatolika preĝejo de la vilaĝo, kiun ni per afabla permeso rajtis uzi.

Sed ni vidu, kio okazis dum niaj komunaj tagoj!

16an de julio sabate posttagmeze ĉiuj partoprenantoj en ordo alvenis al la kongresejo. Ne estis tro multaj homoj, kiuj ĉijare povis viziti nian kongreson, sed tiuj, kiuj partoprenis, estis mirinde aktivaj – dankon pro tio!

Post la vespermanĝo ni havis gajan interkonan vesperon, kiun sekvis vesperpreĝo, kiun mi, la organizanto faris.



En la kapelo Fotis B Áradsson



En la suba salono. Fotis B Áradsson



Agnes Ráczkevy-Eötvös gvidas preĝon. Fotis B Áradsson

17an de julio dimanĉe post la matenmanĝo la prezidanto de KELI, Philippe COUSSON, FR, faris sian unuan prelegon pri nia ĉijara temo, kiu estis: “... kaj Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili” (Ago 15:9)

Poste ni iris en la preĝejon, kie ni partoprenis la lokan Sanktan Meson. La tre simpatia loka katolika pastro kune celebris la meson kun nia esperantista pastro László PERENDY, HU, kaj parton de la teksto mi tradukis al Esperanto. Károly SÓKI, la loka katolika pastro tiel prezentis nin al sia komununo, ke en la historio de homaro, kiam oni volis uzi ununuran lingvon, tiu lingvo ĉiam estis la lingvo de la potenco, kaj Dio neniam permesis tion. Sed lingvo Esperanto kaj esperantistoj ne volas potencon, ili volas pacon en la tuta terglobo – kaj ni esperu, ke ili sukcesos. Post tiuj kortuŝaj frazoj li petis benon al nia kongreso kaj nia laboro.

Post la tagmanĝo Oldřich Arnošt FISCHER, CZ, prelegis al ni tre interese kaj aktuale pri la historio de Ukrainio.

Sekve ni havis ekumenan Diservon, gvidata de Philippe COUSSON, kiu ankaŭ organizis la sekvontan programon: diskutrondon pri la temo. Ni faris kvar grupetojn kaj laŭ demandoj de la preleganto ni diskutis pri detaloj de la temo.

Post la vespermanĝo ni daŭrigis la konatigon, denove vigle kaj tre ŝerce. Vesperpreĝon gvidis Oldřich Arnošt FISCHER.

18an de julio lunde ni havis tre densan programon surloke. La matenpreĝon gvidis Bengt Olof ÅRADSSON, SE. Post la matenmanĝo unue ni aŭskultis la duan prelegon pri la temo de Philippe COUSSON, kaj poste en la diskutrondoj ni pli detale preparolis la



Philippe Cousson prelegas. Fotis Oldřich Fischer



Dum la meso. Fotis B Åradsson



Oldřich Fischer prelegas. Fotis B Åradsson



Dum interkona vespero. Fotis B Åradsson

novajn vidpunktojn.

Antaŭ la tagmanĝo Pavol PETRIK, SK, prezentis al ni Mikuláš LEXMANN, nekonatan esperantiston kaj martiron.

Post la tagmanĝo kaj iom da ripozo Ela KARCZEWSKA prelegis pri sia heroo Vasilij Jakovlevič EROŠENKO, kiun sekvis mia prelego pri Dietrich BONHOEFFER.

Sekve ni aŭskultis la trian prelegon de Philippe COUSSON, kaj kiel kutime en kvar diskutrondoj ni pli profundiĝis en la temon.

Post la vespermanĝo ni havis tre interesan muzikan vesperon. Bálint BAGI, hungara muzikisto, (mia baptofilo) prezentis al ni diversajn lignajn blovinstrumentojn kaj diversajn regionajn melodiojn de hungara popolmuziko.

La tago finiĝis per la vesperpreĝo de Pavol PETRIK.

19an de julio marde post matenpreĝo, kiun faris Oldřich Arnošt FISCHER, ni havis tuttagan ekskurson al la belega urbo Szeged je la rivero Tisza.

Malfacile estis elekti inter la multaj belegaĵoj! Helpis al mi loka ĉiĉeronino Andrea MÉSZÁROS, kiu scias laŭvorte ĉion pri Szeged kaj ankaŭ multe amas sian urbon, kaj tuttage gvidis nin kaj rakontis al ni. Unue ni vizitis belegan sinagogon, kaj poste la same belan katedralon. Estis varma somera tago, do estis bone en ombra ĝardeno tagmanĝi en serba restoracio – tiel preparinte nin mem al la vizito de serba ortodoksa preĝejo, kie la loka pastro ĉarmege kaj senlace rakontis kaj respondis niajn demandojn. Ni finis la programon per ŝipveturado sur la rivero.

Post la vespermanĝo kaj vesperpreĝo de Oldřich Arnošt FISCHER ni ne havis alian



Pavol Petrik prelegas. Fotis B Āradsson



Ela Karczewska prelegas. Fotis Oldřich Fischer



Bálint Bagi montras instrumenton. Fotis B Āradsson



Apud Tisza. Fotis Oldřich Fischer

programon, ĉar ankaŭ la sekvontan tagon ni havis ekskurson, do ni nepre devis ripozi kaj ricevi niajn fortojn.

20an de julio merkrede mi gvidis la matenpreĝon, kaj poste ni iris al Ópusztaszer, kie estas nacia memorparko de hungaroj, ĉar tie okazis la unua granda kunveno de hungaraj triboj, kiam ili decidis resti en Karpatbaseno.

En la granda parko troviĝas multaj memoraĵoj de hungara historio kaj el diversaj hungaraj regionoj, inter alie subĉiela muzeo kun multaj malnovaj domoj kaj konstruaĵoj, kiujn ni libere vizitis. Post la tagmanĝo ni havis rezervitan tempon kun ĉiĉeronino viziti unikaĵon: rondpentraĵon pri la alveno de hungaraj triboj, kiun pentris hungara pentristo Árpád FESZTY dum la jaroj 1892-1894. Tiatempe estis popularaj tiuj grandaj rondbildoj en Eŭropo, sed ne multaj de ili travivis la historiajn okazaĵojn. La rond-pentraĵo de Feszty estas je 1,5 metroj alta kaj je 12 metroj longa. Oni konstruis al ĝi apartan konstruaĵojn, kie ricevis lokon ankaŭ interesa etnografia muzeo.

Post la vespermanĝo mi gvidis biblian rondon per bibliaj citaĵoj, kiujn ni legis kaj interparolis pri ili. La vesperon mi fermis per vespera preĝo.

21an de julio ĵaŭde la matenpreĝon faris Oldřich Arnošt FISCHER, post kiu KELI havis sian kutiman jarkunvenon. Post la tagmanĝo prelegis Bengt Olof ÅRADSSON per la titolo “Ni kaj ili”. Sekvis Diservo kun Sankta Manĝo laŭ protestanta rito. Poste Philippe COUSSON faris sian kvaran prelegon pri nia ĉijara temo. La vesperpreĝon faris denove Oldřich Arnošt FISCHER, kaj



Promeno en Szeged. Fotis B Áradsson



La konkerantaj hungaroj. Fotis B Áradsson



En Ópusztaszer. Fotis Oldřich Fischer



Grupa diskuto. Fotis Oldřich Fischer

poste ni ankoraŭ havis interesan programon: popoldancistoj alvenis, infanoj kaj gejunuloj, kiuj prezentis al ni la dancojn kaj la tradiciajn popolvestaĵojn de la regiono. Vigle kaj gaje ili dancis, kaj je la fino ili ankaŭ sukcesis dancigi nin! Pluraj partoprenantoj kuraĝis eniri en la dancredon kaj lerte kundanci.



Popoldancistoj. Fotis Oldřich Fischer

22an de julio vendrede la tagon ni komencis per la matenpreĝo de Oldřich Arnošt FISCHER. Post la matenmanĝo prelegis Bengt Olof ÅRADSSON pri la sep novaj mortmeritaj pekoj, kiun sekvis mia prelego pri Albert SCHWEITZER. Antaŭ la tagmanĝo ni resumigis la grupan laboron: la grupoj prezentis siajn pensojn pri la prelegoj kaj la gvidaj demandoj. Post-tagmeze ni havis du prelegojn, unue mi prelegis pri Henri DUNANT, la fondinto de Ruĝa Kruco, poste Bengt Olof ÅRADSSON gvidis interesan interparolon “iom lingve”.



Gaja vespero. Fotis B Åradsson

Post la vespermanĝo ni jam alvenis al la lasta vespero, kiu havas la “devigan” programon: la adiaŭan vesperon. Multajn programerojn la kongresanoj prezentis, interesajn kaj tre ŝercajn ludojn, legaĵojn, ŝercojn, kantadojn, do ni havis longan kaj vere amuzigan vesperon, kiun ni finis per la vesperpreĝo de Philippe COUSSON.



Pavel Polnický dum gaja vespero. Fotis B Åradsson

23an de julio sabate mi fermis la kongreson per matenpreĝo. Mi multe dankas al ĉiuj la aktivan partoprenadon, la interesajn preĝojn kaj prelegojn.

Ni multe atendas nian sekvontan renkontiĝon en Pollando, en Bjalistoko, inter 5-12 de aŭgusto 2023.

Ĝis revido tie kaj tiam!



Prezento dum gaja vespero. Fotis B Åradsson

*Ni naskiĝas.
Ni vivas.
Ni mortas.
Ni ne scias, ni ne komprenas: kial?
De kie kaj kien?
Sed ni ekzistas.
Foje ni suferas.
Foje ni feliĉas.
Estas stranga.
Estas kurioza.
Estas nekomprenebla.
Kelkafoje en nebulo ni vagadas.
Ni vojeraras.
Multfoje fascinas nin iu neperceptebla plezuro.
Kaj okazas, ke ni aŭskultas la silenton.
La soleco ne doloras, se ni estas en solo.
Sed la blankaj noktoj ŝtonpezas.
La beleco de la nekredeblaj sonĝoj magias.
Kaj la efemer-longaj ĝojoj fatalas.
Poste subite alvenas la momento.
Envolvas nin la ĉielolazuro de la firmamento.
Jam ni scias, jam ni komprenas: kial.
Kaj ankaŭ tion: de kie kaj kien.
Jam ni kredas, ke la vivo estas granda sekreto.
Jam ni scias, ke la vivo estas granda miraklo.
Jam ni konfesas, ke la vivo estas sekretmiraklo.*

Julia Sigmond
Veano, 2017.09.29.

DIALOGO INTER RELIGIOJ

Kristana kongreso 2023



72-a Kristana Kongreso de KELI
5–12 de aŭgusto 2023
Bjalistoko – Pollando

Karaj gefratoj,

La organizantoj kore invitas vin partopreni la Kristanan Kongreson en la naskiĝurbo de nia Majstro – Ludoviko Zamenhof.

Bjalistoko situas 200 km for oriente de Varsovio, proksime al la landlimo kun Belorusio. La Kongreso okazos en la Porpastra Seminario situanta en la urbocentro, kie atendas vin bone ekipitaj ĉambroj por 98 personoj, manĝosalono, kapelo kaj prelegsalono kun necesaj teknikajoj. Ĉio sub unu tegmento. Tuj apude troviĝas la bela romkatolika Preĝejo Sankta Adalberto. Ni planas montri al vi multreligiecon kaj multkulturecon de la regiono Podlaĥio, ankaŭ dum la kongreskunsidoj ekster la urbo:

- Pri hebreoj en la pitoreska urbeto Tykocin plena de hebreaj spuroj
- Pri ortodoksoj en la fama urbeto Supraśl
- Pri katolikoj en la sanktejo Sankta Akvo
- Pri islamanoj en Bohoniki kaj Kruszyniany
- 2 tagojn ni oferos al la katolika kaj aliaj religioj surloke.

Via LKK

Kongresa adreso

Arkidiocesa Plialta Teologia Seminario, Bjalystok, str. Warszawska 46 (serĉu sur mapo).

Sabate ekde 12:00h nia akceptejo estos malfermita en la vestiblo.

Trajn- kaj busveturantoj

La kongresejo estas atingebla per publika transporto.

De la trajna stacidomo vojaĝu per la linio 2 (direkton Osiedle Dojlidy) ĝis la haltejo “kościół św. Wojciecha”.

De la busa stacidomo (gravas ekz. por tiuj, kiuj vojaĝos per buso de la varsovia flughaveno Okęcie) – vojaĝu per la linio 100 ĝis la haltejo “rzeka Biała” kaj poste ankoraŭ 2 haltejojn per la linio: 2, 8 aŭ 21 – ĝis la haltejo “kościół św. Wojciecha”

Parkejoj

La seminario havas propran parkejon.

Salonoj

La programeroj okazas aŭ surloke en la Seminario (kapelo kaj aŭditoria salonego) aŭ en diversaj lokoj en Bjalistoko aŭ en la vizitataj urbetoj/vilaĝoj.

Pli da informo, kontaktablecoj kaj surreta aliĝo ĉe:

<https://tinyurl.com/2am4a4z2>

ALIĜILO

Mi aliĝas al 72a KELI Kongreso 5–12 aŭgusto 2023 en Bjalistoko, Pollando

S-ro /S-ino Persona nomo:

Familia nomo:

Adreso: A-lando

Lando (en Esperanto): B-lando

Urbo/vilaĝo: Poŝtkodo:

Strato kaj numero:

Telefono:

Retadreso:

Mi preferas dividi la ĉambron kun:

Mi preferas loĝi sola: (Krompago por unulita ĉambro: 250 PLN)

Mi planas alveni je (dato kaj horo, se eblas):

Mi planas foriri je (dato kaj horo, se eblas):

Mi planas alveni per: aŭto , trajno , buso , aviadilo , alie

Mia aĝo: ĝis 65 jaroj , inter 65 kaj 70 jaroj , 70 jaroj aŭ pli

Mi estas: ĉiomanĝanto , vegetarano , alia dieto

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon:

Programerojn por distra vespero:

Alian programeron:

Sendu la aliĝilon al: Elżbieta Karczewska
PL-15-269 Białystok, Pollando
ul. Waszyngtona 14 B m 119

La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo, kiun eblas pagi:

Białostockie Towarzystwo Esperantystów
IBAN: PL45 1160 2202 0000 0000 5482 1484
BIC/SWIFT: BIGBPLPW

Dato: Subskribo:

PERMESOJ

Mi permesas, ke fotojn faritajn dum la kongreso oni rajtu publikigi en la revuo **DIA REGNO**, rete kaj en aliaj medioj*

Jes Ne

Mi permesas publikigi miajn datumojn en presitaj kongresaj eldonaĵoj*

Nur la nomon La nomon kaj la tutan adreson
 La nomon kaj la retadreson Nenion pri mi

Mi permesas publikigi miajn datumojn en la reto*

Nur la nomon La nomon kaj la tutan adreson
 La nomon kaj la retadreson Nenion pri mi

Legu kaj akceptu*

La aliĝilo validas post pago de la aliĝkotizo, kiun eblas pagi al la banka konto. Al personoj, kiuj pro ajna kialo rezignos la partoprenon en la kongreso plej malfrue 7 tagojn antaŭ la komenco de la aranĝo, la organizantoj repagos la kostojn de manĝoj kaj loĝado. Aliajn rezigno-kazojn la organizantoj pritraktos aparte.

Legu kaj akceptu*

Mi legis kaj akceptas la klaŭzon pri datuma protektado.

* Signifas ke estas devige respondi.

Aliĝkotizo:

Ĝis 31.12.2022

A: 200 PLN

B: 100 PLN

Ĝis 31.03.2023

A: 250 PLN

B: 150 PLN

Post 01.04.2023

A: 300 PLN

B: 200 PLN

A-landoj: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de la kategorio B.

B-landoj: lamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio, Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

Kongresa kotizo por personoj loĝantaj en la Seminario:

A: 1400 PLN

B: 1150 PLN

Krompago por unulita ĉambro: 250 PLN.

- Ni garantias tranoktlokojn en 2-personaj ĉambroj en la Porpastra Seminario al 98 personoj.
- Personoj, kiuj memstare aranĝos por si mem tranoktojn, povos mendi tagmanĝon kaj vespermanĝon: 40 PLN/tage.
- Kongresa kotizo por personoj, kiuj memstare aranĝos por si mem tranoktojn kaj manĝaĵojn:
A: 500 PLN
B: 300 PLN

La morto de Peregrino

Lukiano al Kronio: bondezire! – parto tria

Gerrit BERVELING, NL

Daŭrigo de la antaŭa numero

31 Kiam tion li diris, la ĉirkaŭstarantoj kriis: “Ili tuj estu bruligitaj; ili meritas la flamojn”. Kaj la alia descendis ridante, sed ‘Nestoron la kri’ ne eskapis²², mi kompreneble celas Teagenon. Kiam li aŭdis la sonojn, li tuj alkuris, supreniĝis kaj ekkriis aĉaĵojn pri la viro, kiu ĵus estis foririnta — la nomon de tiu indulo mi ne konas. Miaflanke mi lasis lin diskrii la pulmojn kaj foriris spekti la atletojn, ĉar laŭdire la Helenjuĝistoj jam prenis sian lokon en la juĝejo.

32 Jen do ĉio, kio okazis en Eliso. Kiam Olimpion ni atingis, la malantaŭa ĉambro estis plena je homoj, kiuj kritikis Proteon aŭ laŭdis lian intencon, tiel ke la plimulto fine interfrapadis. Fine, Proteo mem aperis, eskortita de sennombra amaso, post la konkurso de la heroldoj, kaj ion diris pri si mem, rakontante pri la vivo kiun li havis kaj pri la riskoj, kiujn li prenis, kaj ĉiujn problemojn kiujn li eltenis pro la filozofio. Lia oratoraĵo daŭris tre longe, kvankam pro la ĉeestanta amaso nur malmulte mi povis aŭdi. Poste, timante frakasiĝi en ĉi amaso, ĉar al pluraj tion mi vidis okazi, mi foriris, forsalutante la sofiston, kiu enamiĝis je la morto, kaj kiu

antaŭ sia morto prononcis sian entombigan oratoraĵon.

33 Almenaŭ tion ĉi mi subaŭskultis; li diris, ke oran pinton li volas meti sur oran arkon²³; ĉar kiu vivis kiel Heraklo, ankaŭ mortu kiel Heraklo kaj ankaŭ miksiĝu kun la etero. “Kaj mi deziras”, li diris “bonfari al la homaro montrante al ĝi la vojon laŭ kiu oni povas malestimi la morton; tial por mi ĉiuj homoj ludu Filokteton”. La pli stultaj inter la amaso komencis verŝi larmojn kaj ekkriis: “Savu vian vivon por la Grekoj!” sed la pli forta parto blekis: “Plenumu vian planon!” pro kio la oldulo sufiĉe konfuziĝis, ĉar li esperis, ke ĉiuj sin kroĉos al li kaj ne transdonos lin al la fajro, sed tenu lin viva — kontraŭ lia volo, kompreneble! Tiu “Plenumu vian volon” atakis lin kontraŭ atendo kaj faris lin pli pala, kvankam lia koloro jam estis mortsimila, kaj eĉ leĝere igis lin tremi, tiel ke sian paroladon li finis.

34 Sed mi, ho kiom mi ridis; ĉar ne decas kompati iun viron, kiu tiel terure amis gloron pli ol ĉiuj ceteraj, kiujn pelas la sama Furio. Kiel ajn, akompanis lin amasoj kaj li atingis plejan gloron dum li mirgapis la nombron de siaj admirantoj, ne sciante,

la kompatindulo, ke homoj survoje al la kruco aŭ trenataj de ekzekutanto havas ofte eĉ pli da publiko post si.

35 Baldaŭ finiĝis la Olimpiaj Ludoj, la plej brilaj Olimpiaj Ludoj, kiujn iam mi spektis, kvankam tiam kvarafoje mi estis spektanto. Ĉar ne estis facile certigi por si ĉareton, ĉar multaj sammomente volis foriri, kontraŭvole mi iom ĉirkaŭvadis, kaj Peregrino daŭre prokrastis, sed fine fiksitis nokton en kiu li aranĝos sian kremaciigojn; do, ĉar unu el miaj amikoj invitis min akompani lin, meznokte mi leviĝis kaj prenis la vojon al Harpino, kie estis la brulŝtiparo. Tio estas ekzakte dudek stadioj de Olimpio, se okcidenten oni iras malantaŭ la hipodromo. Tuj kiam ni alvenis, ni trovis brulŝtiparon konstruitan super truo pli malpli ses piedojn profunda. Ĝi pleje konsistis el torĉligno, arbetaro aŭ simile, kio facile povas forbruli. **36** Kiam la Luno leviĝis — ĉar ankaŭ ĝi devus spekti liajn glorajn farojn — li alproksimiĝis vestita en sia kutima maniero, kaj kun li la gvidantoj de la Cinikuloj; specife la sinjoro de Patraso, kun torĉo — ne malbona duarolulo. Ankaŭ Proteo portis torĉon. Homoj, venante de ambaŭ flankoj, instigis la fajron je pli forta flamado, ĉar ĝi venis el toĉligno kaj arbetaro. Peregrino — kaj nun donu al mi vian plejan atenton! — flankenmetante la monujon, la mantelon kaj tiun faman Heraklo-klabon, staris tie en rekte malpur-ega vestaĵo. Tiam li petis, ke incenson oni metu sur la brulŝtiparon; kaj iu prezentis tion al li, li plu ĵetis ĝin kaj rigardis suden — eĉ tiu ‘suden’ rilatis al lia prezentado

— kaj samtempe diris: “Spiritoj de mia patrino kaj de mia patro, akceptu min kun favoro”. Kaj kun tio li saltis en la fajron; tamen pro la flamoj li ne estis videbla, sed li estis ĉirkaŭita de la flamoj, kiuj alte leviĝis.

37 Denove mi vidas vin ridi, mia kara Kronio, ĉe la malnodiĝo de ĉi dramo. Miaflanke, kiam la gardospiritojn de sia patrino li alvokis, mi ne forte lin kritikis, sed kiam tiujn de sia patro li same alvokis, mi rememoris la rakontojn kiujn mi aŭdis pri ties murdo, kaj mi ne regis mian ridemon. La Cinikuloj staris ĉirkaŭ la brulŝtiparo, certe ne plorantaj, sed silente pruvantaj certan kvanton da ĉagreno dum ili rigardis en la fajron, ĝis mi voĉon levis al ili kaj diris: “Ni foriru nun, ho stultuloj. Ne estas agrabla vidaĵo rigardi la maljunulon, kiu estis rostita, pleniganta nian nazon per tiu aĉaodoro. Aŭ ĉu vi atendas pentriston por portreti vin kvazaŭ la amikojn de Sokrato apud li en la malliber-ejo?” Ili estis koleraj kaj insultis min, kaj kelkaj eĉ ekprenis siajn bastonojn. Sed kiam mi minacis kolekti kelkajn por puŝi ilin al la brulŝtiparo, por sekvi sian mastron, ili regis sin mem kaj tenis sin silentaj.

38 Kiam mi revenis, mi pensis tre forte, amiko: Kia strangaĵo estas ja homa gloramo; kiel nur tiu pasio estas neeskapebla eĉ de tiuj, kiujn oni konsideras plej admirindaj, des pli de tiu viro kiu en aliaj aspektoj vivis vivon stultan aŭ senpripensan kaj nur taŭgan por la fajro. **39** Tiam multajn mi renkontis, kiuj venis

por mem vidi la spektaklon, ĉar ili esperis lin ankoraŭ trovi vivanta. La antaŭan tagon li ja ankoraŭ sciigis, ke la Leviĝantan Sunon li salutos, kiel efektive oni diras, ke faras la Brahmanoj antaŭ ol suriri sur sian brulŝtiparon. Nu, la plimulton mi forsendis dirante, ke la afero jam okazis, tiujn por kiuj ne tiom gravis vidi la efektivan lokon, kaj kolekti iom da relikvaĵo el la brulŝtiparo.

En ĉi tio, mia amiko, sennombraj estis la demandoj poste, — ke mi rakontu ĉion, ĉar ili deziris ekzaktan informon. Kiam edukitan viron mi rimarkis, mi pretis rakonti al li la historion sen ornamo, kiel mi faris al vi; sed por plezurigi la stultulojn, kiuj ekscitite aŭskultadis, mi iom densigis miamaniere la historion, rakontante kiel, kiam la brulŝtiparon oni ekbruligis kaj Proteo sin mem tutkorpe enĵetis, unue okazis granda tertremo, akompanate de blekado de la tero, kaj tiam vulturo, suprenflugante meze el la flamoj, ekiris al la Ĉielo, dirante, en homa lingvo, kun laŭta voĉo:

“Teron mi lasas, iras for al Olimpo.”

Miraklotrafitaj ili estis kaj kun tim-tremo ili demandis min, ĉu la vulturo rapidis orienten aŭ okcidenten; mi respondis tute laŭplaĉe.

40 Reirante al la festivalo, mi renkontis grizharulon, kies vizaĝo, ja Zeŭso, inspiris fidecon ankaŭ pro lia barbo kaj lia ĝenerala aspekto. Li rakontis ĉion pri Proteo, kaj kiel post lia sinbruligo li vidis lin en blanka vestaĵo antaŭ nelonge

kaj nur ĵus forlasis lin, dum li gaje paŝis en la Portiko de la Sep Voĉoj²⁴, kun krono el sovaĝa olivo. Tiam li eĉ aldonis la vulturon, ĵurante, ke li mem ĝin vidis forflugi el la brulŝtiparo, dum mi mem flugigis ĝin ĵus por moki stultulojn kaj idiotojn.

41 Imagu, kio okazos liahonore post nelonge, kiom da abeloj ekloĝos tiuloke, kiuj cikadoj ĉirpos tie, kiuj korvoj tie ja flugos, same kiel ĉe la tombo de Heziodo²⁵ kaj tiel plu! Koncerne statuojn pri li mi scias, ke multajn baldaŭ starigos la loĝantoj de Eleo kaj ankaŭ aliaj Grekoj, al kiuj li sendis leterojn. Estas rakontate, ke al preskaŭ ĉiuj gravaj urboj leterojn li dissendis — deponaĵojn testamentajn por tiel diri, kaj instigojn kaj preskribojn — kaj li indikis amason da reprezentantoj tiucele el inter siaj amikoj, kiujn li nomis ‘senditoj el la morto’ kaj ‘subteraj kurieroj’.

42 Tiel finiĝis la kompatinda Proteo, viro kiu (se diri koncize) neniam fiksas sian rigardon al la vero, sed ĉiam diris kaj agis konsidere je gloro kaj laŭdo fare de la amaso, eĉ tiuekstreme, ke li saltis en la fajron, dum li estis certa ne ĝui la laŭdon, ĉar tion li ne povos aŭdi.

43 Unu aferon mi tamen ankoraŭ devas aldoni al ĉi historio, antaŭ ol fini, por ke vi bone ridu. Ĉar certe longe vi jam konas tiun alian mian rakonton, ĉar vi ja rekte aŭdis ĝin de mi, kiam dum mia reveno el Sirio mi raportis, kiel mi ŝipvojaĝis

de la Troado kune kun li, kaj mi rakontis pri lia ĝuemo sur la vojaĝo, kaj pri la bela knabo kiun li persvadis fariĝi Cinikulo, por ke ankaŭ li havu sian Alcibiadon, kaj kiel, kiam dumnokte meze de Egea Maro ni estis ĝenataj de tempesto, kiu suprenkaj subenigis enorman maron, tiu mirinda persono, kiu estis kredata stari super la morto, ekfalas plorante same kiel la virinoj!

44 Nu, mallonge antaŭ la fino, ĉirkaŭ naŭ tagojn eble manĝinte pli ol sufiĉe, li estis malsana dumnokte, kaj eksuferis fortan febron. Tion mi aŭdis de Aleksandro la kuracisto, kiu surmare estis vokita al li. Li diris, ke li trovis lin ruliĝanta surplanke, nekapabla elteni la bruladon, petante vere pasie pri iom da frida akvo, sed ke li ne volis doni tion al li. Krome li rakontis al li — li diris — ke la Morto, se tiu absolute deziras havi lin, el si mem venos al lia pordo, por ke tiun li akompanu libervole, sen peti ajnan favoron de la fajro; sed Proteo respondis: “Sed tiumaniere mi ne estus atentinda, mortante kiel ĉiu alia homo.”

45 Jen la historio de Aleksandro. Kaj ne multajn tagojn antaŭe mi vidis, kiel liaj okuloj estis ŝmiritaj per unĝento por ke la akra pomado igu ilin larmadi.

Ĉu vi komprenas? Eako malvolonte akceptas homojn kun malfortaj okuloj! Estas, kvazaŭ homo krucumota unue devas kuracigi kontuzaĵon sur la fingro. Kion vi pensas, ke farus Demokrito, se tion li vidus? Ĉu li ne ridus pri la viro tiel laŭte kiel li meritis? Kaj tamen, de kie tiom da ridado li ricevus? Nu, mia amiko, ankaŭ vi bone ridu, precipe se vi aŭdas pri la ceteraj, kiuj lin admiras²⁶.

— Piednotoj

22. Iliado 14:1

23. Pandaro, iu Trojano en *Iliado* IV,111 metas oran pinton sur arkon, kiun li faris el korno. La ora arko de Peregrino estas lia vivo (sama Greka vorto, sed kun malsama akcento).

24. Fama pro sia eŝo, laŭ Paŭzanio kaj Plinio.

25. Kiam Orĥomenon trafis pesto, la pastroj de Delfo diris, ke la sola saviĝo estas reportadi el Naŭpakto la ostojn de Heziodo, kaj iu korvo montros al ili la tombon.

26. Karakteristika fino por Lukiano.

Rimarko 1: ĉapitroj 36, 39 kaj 44 intense estas aliaj.

Rimarko 2: ĉe la piednoto 16 de paĝo 94 (DR 4/2022); ĉe la piednoto “restis” devas esti “rostis”.

☞

Afabla vorto pli atingas ol forto.

Zamenhofa proverbo

Bibliaj Tagoj en la Romia urbo Trier

de 2023-03-08 ĝis 2023-03-12
(merkredo - dimanĉo)

Organizanto:

Esperanto-Ligo por Kristanoj en
Germanujo r.a.
Prezidanto: Wolfram Rohloff,
Am Marktplatz 82,
D-09496 Marienberg-Zöblitz

Partopren-kotizoj:

La prezo por tranoktado kaj 3
manĝoj tage en 2-lita ĉambro
(surteraj litoj) kun duŝo/necesejo,
ekskursa programo 270 € por ĉiu
persono.

Rabatoj: Loĝantoj en eksterlando -65 €, en Germanio loĝantaj KELI-membroj -25 €. Krompago por 1-lita ĉambro (entute): +32 €.



Programo

Diskutoj kaj prelegoj pri religiaj temoj, komunaj preĝado kaj kantado el "Adoru".
Wolfram Rohloff preparas la kadran temon: "La leteroj de Petro."
Ĵaŭde ĝis sabate: Ulrich Matthias gvidos posttagmezan ekskursan programon en
Trier kaj ĉirkaŭo. Aktualajn detalojn vidu en la Interreto: ww.esperanto.de/keli.

Muzika organizanto: Stefan Lepping

Kondiĉoj de aliĝo

Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 30 € por ĉiu persono kaj estos konfirmata post ricevo. La reston nepre pagu ĝis la **4a de januaro 2023**, ĉar la junulargastejo postulas ĝis tiam la pagon de la kotizoj. La antaŭpago ne estas repagebla, sed vi povas ĉiam aliĝigi anstataŭanton (samseksan). Tiu, kiu havas tro malmultan monon por povi pagi la partoprenkotizojn, turnu sin al la komisiito pri eksterordinara subvencio.

Ajnajn demandojn direktu al la komisiito por la Bibliaj Tagoj:

Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde

☎ 0049 2573 / 626 und 0049 151 5133 6794

✉ fischru@uni-muenster.de

Maksimuma nombro de partoprenantoj: 29

Jen mi aliĝas definitive al la Bibliaj Tagoj
de 2023-03-08 ĝis 2023-03-12 en Trier.

(titolo+) nomo: _____

strato/domnum.: _____

kodo, urbo: _____

telefono: _____

poŝtelefono: _____

retpoŝta adr.: _____

membro de KELI kun "Dia Regno" jes ne

vegetarano / laktozo / ceteraj limigoj _____

Mi jen mendas 2-litan ĉambron kune kun:

Nomo: _____

vegetarano / laktozo / ceteraj limigoj _____

La sumon de _____ € mi ĝiris je

_____ (dato)

al la sekvanta konto:

Esperanto-Liga für Christen, Ev. Bank Kassel
IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC GENODEF1EK1

UEA-konto de Rudolf Fischer: rfis-w

Rimarkigoj / proponoj:

**Bv. sendi la suprajn datumojn poŝte aŭ
elektronike al:**

D-ro Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a,
D-48356 Nordwalde, Germanujo
✉ fischru@uni-muenster.de



Ĉu la homa vivo estas vana?

Predikanto 2,18–23, komentita de Jerald VEIT, Usono

La Predikanto (Kohélet) estas unu el la tiel nomitaj “saĝecaj libroj” de la Malnova Testamento. Ĝi ofte entenas pli malpli pesismismajn pripensojn de la vaneco de la homa vivo (“Vantaĵo de vantaĵoj, diris la Predikanto; vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo.”) Tamen, spite la ĉiu negativismo, ĝi instigas nin profunde pensi pri la naturo de la surtera vivo, kaj specife pri nia vivo. Kio estas grava, kaj kio ne? Ni do laboru por io, kio havas eternan signifon, kaj ne por pasantaj aĵoj, kiujn ni perdos post nia forpaso.

*

“Kaj mi ekmalamis ĉiun laboron, kiun mi laboris sub la suno; ĉar mi devos lasi ĝin al homo, kiu estos post mi. Kaj kiu scias, ĉu estos saĝa aŭ malsaĝa tiu, kiu ekposedos mian tutan laboron, pri kiu mi penis kaj streĉis mian saĝon sub la suno? Ankaŭ ĉi tio estas vantaĵo. Kaj mi decidis, ke mia koro atendu nenion de la tuta laboro, kiun mi laboris sub la suno. Ĉar ofte oni vidas homon, kiu laboras en saĝo, scienco, kaj talento, kaj li devas fordoni sian akiron al homo, kiu ne laboris por ĝi; ĉi tio ankaŭ estas vantaĵo kaj granda malbono. Kaj kio restas al la homo de lia tuta laborado kaj de la zorgoj de lia koro, kion li laboras sub la suno? Ĉar ĉiuj liaj tagoj estas suferoj, kaj liaj okupoj estas maltrankvileco; eĉ en la nokto ne trankviliĝas lia koro; ankaŭ ĉi tio estas vantaĵo.”

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

30. novembro


Mia Patro, mi dankas vin pro ĉiuj, kiuj jam eniris en Vian ripozon. La firma espero je mia ĉiela heredaĵo prilumu mian teran laboron. Mi ne ripozu antaŭ ol mi estas farinta mian plej grandan eblon por mia kunbomo, por ke ankaŭ tiu ekkonu Vin kiel la Savanton de la mondo, en kiu estas eterna vivo.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.




El multaj grajnoj la unu pan'

(originale verkita en Esperanto)



ivg

1. El mul - taj graj - noj la u - nu pan'._____
2. Ni pre - nu, man - ĝu: Jen Li - a korp'._____
3. Li no - mas fra - toj, fra - ti - noj nin._____



El mul - taj be - roj la u - nu vin'._____

Ni pre - nu, trin - ku: Jen Li - a sang'._____

Ge - fi - loj ni de l' ge - pa - tra Di'._____

refreno:



U - nu ni es - tas en Kris - to Je - su'. U -



nu ni es - tas en Kris - to Je - su'.

Vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo. (el Gal 3,28)